


Trimestriel
3ème trimestre
2012

LA INFORMILO


N° 159
30 septembre
2012



l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières



esperanto
France-Est



esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

L'espéranto, tremplin vers la paix ...

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR - 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara

15 €

eksterlando

18 €



... l'amitié et le développement

... tel était le thème du **97ème Congrès Mondial d'espéranto** qui s'est déroulé à Hanoï, du 29 juillet au 4 août, rassemblant près d'un millier de participants de 62 pays.

On lira dans ce bulletin la résolution finale qui réaffirme l'importance de la langue internationale laquelle fête cette année les 125 années de son existence, témoignant d'une vitalité encore accentuée par les techniques modernes de communication.

Comme le rapporte le "Courrier du Vietnam", cet évènement a permis au pays hôte... "de présenter ses sites, son peuple et sa culture aux amis internationaux". Dans cette optique, une version espéranto du "Journal intime de Dang Thuy et de Kieu" -chef-d'œuvre de l'écrivain *Nguyen Du*- a été présentée aux congressistes. A cette occasion, la vice-présidente de la République, *Nguyen Thi Doan* a décerné l'*Ordre de l'Amitié de l'Etat vietnamien* à l'Association Universelle d'Espéranto (UEA).

« La Informilo » offre à ses lecteurs un diaporama coloré quasi exhaustif du Congrès et du "post-congrès" élaboré par notre ami André GROSSMANN.

C'est Reykjavik, capitale de l'Islande, qui accueillera pour la seconde fois le prochain rassemblement mondial, du 20 au 29 juillet 2013. Une fiche d'inscription, jointe à ce bulletin, est d'ores et déjà à la disposition des futurs participants.

Espéranto France-Est	esperanto France-Est	Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Poi DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro Poi DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asesores	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alian Collignon	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 15 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

SOMMAIRE	
1 page frontale	15 97 UK (3)
2 ours	16 post UK
3 angulo de la prezidanto	17 post UK (2)
4 Fontenoy – UHA	18 post UK (3)
5 festival des langues	19 Nadzjeja
6 Mulhouse Eo	20 argumentaire
7 Betschdorf / Cameroun	21 la presse
8 Betschdorf / Cameroun 2	22 polemiko
9 Message LC Zamenhof	23 Albanio (1)
Progr Grésillon	24 Albanio (2)
10 Résolution UK	25 Android – timbre
11 Poincaré – kinejo UEA	26 ni provu rideti
12 Jubilé Grésillon	27 distra angulo
13 97 UK (1)	28 en nia fototeko
14 97 UK (2)	

ISSN 0291 6037 trimestriel
N° CPPAP : 0409 G 83517
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle
Esperanto France-Est
MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République
54000 NANCY
Directeur de la publication : Edmond LUDWIG
Rédacteur : Poi DENIS
Dépôt légal : 30 septembre 2012
Imprimé par l'imprimerie de l'encre
55000 Hargeville-sur-Chée

Estimataj !



Ĉi-angul(eg)e mi transdonas la parolon al du elzasaj poetoj/verkistoj/hitoriistoj/ĵurnalistoj, por demonstri ke...

- enradikiĝo en loka kulturo kaj malfermo al la vasta mondo sin kompletigas.
- amantoj de sia regiona lingvo same batalas por ties savo, kiel esperantistoj por la agnosko de sia ankoraŭ futureca (jes, jes !) komunikilo.

Martin GRAFF kaj Gérard LESER loĝas en la valo de Munster. Vi do ne miros, ke mi elektis miajn samvalanojn por miaj tradukoj !

Viajn radikojn kroĉu alĉiele

Viajn radikojn kroĉu alĉiele
kaj surgrimpu la stelojn

Eliru vian truon
Eliru vian kelon
Forlasu vian kaĝon
Forlasu vian timon



Viajn radikojn kroĉu alĉiele
kaj surgrimpu la stelojn

Vi malkovros, fine, trans la limoj
aliajn landojn, aliajn korojn

Vi malkovros fine trans la limoj
vian propran landon, vian propran koron

Martin GRAFF

REKVIEMO POR MORTA LINGVO

Ili alvenis
de ĉie
kun seriozaj vizaĝoj
kaj nigraj frakoj

Ili alvenis
kun bukedoj
kaj funebraj florkronoj
kun tristaj mienoj
kaj ruĝaj okuloj

jam delonge oni sciis
ke ĝi malsanis
kaj daŭre
plipaliĝis

daŭre oni esperadis
ke ĉio liboniĝos
foje eĉ
aŭdiĝis ke denove bonfartas
sed pli kaj pli
ĝi subenŝtumbliis

kaj iam
ĝi forpasis
sen ia ajn plendeto
sen suspiro
nurnuris plu
haŭto kaj ostoj

longaj paroladoj
estis elbuŝigitaj
kaj saĝaj vortoj
estis tritikaj
ĉiu deziris plej adekvate scii
pro kio ĝi mortis

subite
ĉiuj ĝin denove amis

tiam iu ekstaris
kaj ekvortis

ĉiuj ni
kulpas
pro ĝia morto
ni lasis ĝin kadukiĝi
ni lasis ĝin soifi ĝismorte
ni tranĉis al ĝi ĉiujn radikojn
ni ne plu donis al ĝi la rimedojn
por resaniĝo
ni jam delonge ĝin konsideris entombigita

sed kiu scias
eble
tamen ekzistos
iu PASKO
por nia LINGVO

Gérard LESER

Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association *Espéranto France-Est*

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vous serez informé non seulement sur l'histoire et sur la vie actuelle de notre association, mais encore sur les activités des groupes locaux, sur les initiatives des espérantophones isolés ...

et sur l'Espéranto en général ! Également à votre disposition la liste exhaustive de notre « libro-servo » !

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde.

agadas lokaj « gesamcelanoj » !

Fontenoy-la-Joûte

Village du livre

Merkrede la 15-an de Aŭgusto, Jacques HERLÉ iniciatis deĵoradon en la « vilaĝo de la libroj », Fontenoy-la-Joûte.

Ekde la mateno deĵoris Jacques HERLÉ kaj Alain COLLIGNON, sub la bela prezentotendo disponigita de Jacques.

Posttagmeze kundeĵoris Micheline COLNOT, Gisèle BERTAPELLE, Liliane BERSWEILER, Lucile GEREMIA kaj Edmond LUDWIG. Agrablis la vetero kaj vizitis la budon grandparte klera publiko.

foto E. Ludwig



e-alsace.net

A LA UNE l'Espéranto à l'université

L'espéranto est enseigné à l'UHA, *Université de Haute-Alsace* à Mulhouse. Une conférence avait lieu le mercredi 12 septembre pour découvrir cette langue universelle.

L'**Université de Haute-Alsace** est pionnière dans le développement de compétences transfrontalières avec le projet NovaTris, labellisé dans le cadre de l'appel à projets national IDEFI pour les formations innovantes.

L'UHA continue à innover vers l'international par l'enseignement de la langue Espéranto.

Yann Kerdiles, Doyen de la Faculté des Lettres et Sciences Humaines (FLSH) a organisé une conférence le mercredi 12 septembre pour présenter l'apprentissage de cette langue universelle.

le qu'est l'Espéranto.

Le conférencier, Cyrille Hurstel, praticien du bilinguisme précoce a présenté les résultats que l'on peut obtenir par la langue internationale Espéranto. Parmi eux, les voyages de sa fille, partie seule à la découverte de la culture allemande à l'âge de 12 ans et sur la voie de l'entrepreneuriat avec la publication d'un guide pratique. L'espéranto est un outil à la portée inattendue pour l'ensemble des étudiants de l'UHA.

Nous avons parlé de la famille Hurstel dans une brève plus ancienne : "Obernai : voyager à l'étranger".

PHOTO : Yann Kerdiles, Enseignant-chercheur à l'Université de Haute Alsace (Mulhouse), spécialiste de linguistique anglaise et de sémiotique, Doyen de la Faculté des Lettres, Langues et Sciences Humaines.



Dank'al CARITAS, nia nun bone konata aktivulo Fernando NKANI povis ne nur pilgrimi al LOURDES, sed ankaŭ viziti GAVARNIE.


Se vi pensas, ke li nur pasive turismis, vi eraras !

Vidu lian dorsosakon reklaman !

Dank'al ĝi li realvarbis eksajn gelernantojn.

En COLMAR li instruas la lingvon kaj organizas lingvo-festivalon (Legu aliloke).

E. Ludwig



... informo rekte el nia libroservo ...

juvelo sur via libro-breto !

« Bildvortaro de Esperanto » estas **800-paĝa** verkego kun pli ol **30 000 terminoj** kaj ilia aspekto. La nuna eldono estas bazita sur la iama eldono de Rudiger Eichholz, kiu siavice estis bazita sur la 2a eldono de la fama bildvortaro de la germana eldonejo Duden. Prezo 38,00 € - Mendo ĉe nia Libro-servo, 37, rue Pierre et Marie Curie, FR - 54000 VANDOEUVRE



1^{er} festival de langue Afro-Alsa-Espérantophone, foyer Sainte Marie , 14 rue Maimbourg à Colmar, 20 octobre 2012 de 9h30 à 18h00

Objectif :

- Faire découvrir les langues africaines et l'espéranto aux alsaciens et la langue alsacienne et l'espéranto aux personnes d'origine africaine.
- Renforcer les relations d'amitié entre les communautés européennes, africaines et espérantophones d'Alsace, d'Allemagne et de Suisse.
- Promouvoir les langues africaines au même titre que les langues européennes

Organisé par l'association Euro-Afrika– Solidareco,
Siege social :83, rue de Logelbach colmar 68000
Avec la participation d'africains, d'alsaciens et d'espérantophones

Les intervenants

1. M. Gérard CRONENBERGER

Président de l'Association des Élus d'Alsace pour la promotion de la langue et de la culture alsaciennes (AEAPLAL),

Vice-président du Comité Fédéral pour la Langue et la Culture Régionale en Alsace et Moselle,

Maire de la commune d'Ingersheim.

Thème ::L'histoire de l'alsacien

2. M. Bienvenu SENE MONGABA

Doctorant en chimie et Directeur général des éditions MABIKI / Bruxelles, Belgique

Thème :

Les langues africaines comme langues d'enseignement. Le cas de l'enseignement de la chimie en « lingala » en RD du CONGO.

3. M. Jozefo CHIRIMWANI SIRONGE

Polyglotte, membre de l'association SAT-AMIKARO

À chacun sa langue, une langue pour tous

A chacun son pays, une planète pour tous.

Programme

9h00-9h30 : Accueil du public

9h30-9h45 :

Mot de circonstance :

en français par le président : M. Blanchard BOPAKA, en espéranto par le vice président. Mr Fernando KINKANI,

9H45-10H00 :

Présentation des délégations

10h00- 10H30 :

Intervention de M. G. CRONENBERGER

10H30-10H45 : Pause

10h45-11h15 :

Intervention de M. SENE MONGABA

Bienvenu

11h15-11h30 : Pause

11h30-12h00 : Intervention de

M. Jozefo CHIRIMWANI SIRONGE

12h00 – 14h00 : Déjeuner

14h00 – 15h00 : Ateliers

15h00 – 15h45 : Animation culturelle/poèmes

15h00 – 16h30 : Grande réunion plénière (adoption des recommandations des ateliers)

16h30 – 18 h00 : Expositions et danses africaines

3 STANDS seront mis à la disposition des associations pour présenter leurs projets en Afrique :

1. CARITAS /COLMAR : projet au Cameroun

2. AVE : projet en Tanzanie

3. ESPERANTO France-Est, TAKE et ME

Restauration:

Mets africains et alsaciens

10 € le plat

Observations

Collecte de chaussures et vêtements pour les enfants orphelins d'Afrique & les populations africaines en difficulté.

INVITE SPECIAL : le musicien espérantophone africain ZHOU – MACK MAFUILLA et son GROUPE "La Fève".

Localisation du site

Foyer Sainte Marie
14, rue Maimbourg
à Colmar

MULHOUSE ESPERANTO kaj ties aktivaĵoj

Dum la lerno-jaro 2011-2012 la grupo de Mulhouse-Esperanto organizas diversajn aktivaĵojn.

En la kulturcentro Espace 110 okazis regule ĉiu-marde vespere Esperanto-kurso por progresantoj. Komence ni uzis la librojn kaj ekzercojn de "Katrina". Poste ni komencis legi kaj komenti la bild-rakonton de Tinĉjo en Tibeto.

Verdaj Fadenoj en Mulhouse kaj Saint-Louis

Ne ĉiuj membroj deziras sekvi ĉiu-semajne Esperanto-kurson, sed preferas simple parole uzi la lingvon, okaze de amikaj kunvenoj. Jacques kaj Bertrand iniciatis monatajn kunvenojn en iu restoracio, kie eblas ankaŭ simple vespermanĝi.

Ili okazas principe la lastan lundon de la monato alterne en Saint-Louis proksime al la svisa landlimo, kaj en Mulhouse. Intertempe ili ricevis la nomon "Verdaj fadenoj" por montri la ligan de la partoprenantoj al la lingvo. Krome ankaŭ partoprenas membroj de la Bazela grupo, kiam ni kunvenas en Saint-Louis. Babiladoj kaj konversacioj okazas nur en Esperanto por ĝui la lingvon kaj iel progresi, sed krokodilantoj estas malŝatataj.



Verda fadeno en Saint-Louis.

Vitarue

Tiuj 3 kunmetitaj vortoj signifas "ĝu-vivu vian straton". Ĉe la bordo de la rivero Ill en Mulhouse tiu asocio proponas, ke asocioj kaj homoj prezentu siajn aktivaĵojn al la publiko. Tabloj kaj seĝoj estas senpage metitaj je dispono, tamen nenio estu aĉetebla aŭ vendebla.

Yves proponis, ke ankaŭ nia grupo Mulhouse-Espéranto partoprenu tiun eventon ĝuste por montri Esperanton al la juna publiko. Ekde la 20a de majo ĝis fine de julio ĉiu-dimanĉe matene de la 10a30 ĝi la 12a30. Dum tiuj 10 dimanĉoj deĵoris pluraj membroj de nia grupo 2 aŭ 3-foje. La etoso estis tre simpata, ofte kun bela vetero. Ni sukcesis bone informi pri Esperanto.



Les activités de demain

- **Langues** : espéranto.
- **Avenue Vitaminée** : cuisses abdos fessiers, ultimate, marche nordique, urban athlétisme, graff, aqua fitness, boxe.
- **Passage des Gourmets** : cuisine végétarienne.
- **Cour des Sens** : fabrication de nichoirs.
- **Place des Jeux** : jeux anciens, contes sur l'histoire d'Angleterre (association Étincelle).



Nia amiko Bertrand Wick el Village-Neuf kreis novan retejon. Ĝi proponas vastan menuon por informiĝi pri Esperanto, por trovi muzikojn, librojn, radio-staciojn, kiuj elsendas en Esperanto. Jen la retejo: <http://www.wix.com/esperanto3f/villageneufeo> |

Esperanto kreis fortan amikan ligan inter Betschdorf (Alzaco) kaj Kameruno !

Pastro Gabriel ANDA estas aktuale programdirektoro de *Radio Maria Cameroun* kaj vikaro en paroĥo en la diocezo de EDEA. La sekvan kortuŝan leteron li sendis al LA INFORMILO. Akompanis lian rakonton la jenaj frazoj : « *Mi konfessas al vi, ke mia rilato kun Avineto Odette estis tiom bela, pura kaj forta, ke eĉ nun mi ankoraŭ havas larmojn en la okuloj, kiam mi pensas pri ŝi. Ne estas larmoj pri malĝojo, sed larmoj de gratuloj kaj dankemo al ŝi. Ŝi estis la instruistino, la amikino en la vera senso, la patrino, ĉefe la Avineto !* ».

En mia kamerunia unuopuleco mi finlernis la unuajn bazajn lecionojn laŭ la metodo *Henri Ferez*, kiun donis al mi amiko. Mi ne sciis, kion mi devis fari per tiu nova lingvo, kiun mi ĵus malkovris. Tamen mi rimarkis la adreson de *Sro Hans BAKKER* je la fino de la lasta paĝo, kaj mi skribis al li, demandante kion mi devas fari (Hans Bakker estis la tiama estrarano por Afriko ĉe UEA), kaj post kelkaj semajnoj li respondis al mi, sendante diplomon, kiu atestas, ke mi nun povas korespondi, ĉar mi sufiĉe mastras la lingvon, sed li konsilis al mi daŭrigi la lernadon en la dua nivelo, per la kurso "*Por la praktikantoj*" ĉe *S-ro Odette Scheidel*, kaj li indikis ŝian adreson.



Tuj mi skribis al Odette Scheidel, kiu estis tute nekonata de mi, dirante ke mi estas sendita de S-ro Hans Bakker. Post kelkaj semajnoj mi ricevis de Odette, mia nova instruistino, la kurslibron, la respondkuponon kaj la korekton de mia letero. Jen kiel ni ekrilatis kun ŝi. La distanco inter Kameruno kaj Francio estas sufiĉe granda, kaj la poŝt servo ne tiom rapida inter Eŭropo kaj Afriko. Tiel ni pritraktis unu lecionon ĉiumonate. La nova libro enhavis cirkaŭ 16 lecionojn aŭ iom pli. Tiutempe mi estis studento en granda seminario por iĝi pastro en Kameruno. Mi samtempe lernis Esperanton, sed sen paroli. Iam mi petis de ŝi kasedojn kaj vortaron por pligrandigi mian vortprovizon. Tion ŝi sendis kun multe da plezuro.

Tiu lernado daŭris de 1994 ĝis 1998. Poste mia tiama episkopo donis al mi stipendion por daŭrigi en Francio. La 23-an de Decembro mi alvenis la unuan fojon en Eŭropo, kaj tuj post Kristnasko mi telefonis al ŝi, ke mi nun estas en Francio.. O Dio mia !!! Tio estis la unua fojo, ke mi parolis en esperanto ĉe la telefono. Mi tremis por diri : "*Mi... mi... mi... estas... estas... estas .. via lernanto el Kameruno, kaj nun mi estas en Francio ...*". Tio estas neforgesebla momento. Ŝi ege ĝojis ... !

Do mi estis en Francio ĉe la Abatejo de *Champagne-sur-Rhône*, kie mi studis teologion. Ni dume daŭrigis la esperantan kurson *Por la praktikantoj*. Intertempe nia rilato iĝis pli gefrateca. Mi iĝis ne plu simpla lernanto, sed nepo de Avineto. Ŝi plezurigis min per diversaj donacoj. Mi malkovris la naskiĝdatan feston, kiun mi neniam festis en mia lando. Ĉiun semajnon preskaŭ mi ricevis leteron de ŝi kaj kiam mi respondis, la venontan fojon ŝi sendis la korekton de mia sendita letero, tiel ke ne ekzistis diferencoj inter la kurso kaj la korespondado.

Finfine alvenis la momento, kiam mi devis daŭrigi la studadon en Strasburgo en 2000/2001. Fine de septembro ŝi estis en Strasburgo kaj ni renkontiĝis ĉe la stacidomo. Estis granda plezuro partigita kaj ŝi invitis min post kelkaj semajnoj por partopreni la Zamenhof-feston, kiu okazis ĉe ŝi. Tiukaze mi konatiĝis kun la aliaj samideanoj de Alzaco : gesinjoroj *Stammach, Ludwig, Wolffer, Krummeich, Schmitt*. Tiun semajnfino mi tute travivis hejme en Betschdorf. Je mia alveno ŝi ĝojis kaj diris : « *Bonvenon al vi, nepo mia, vi estas hejme !!! Sed ne ĉe vi-mem* ». Kaj tio multe ridigis min, ĉar tia parolmaniero ne ekzistas en mia kulturo. Alia surprizo, kiun mi neniam forgesos, estas ke la ĉambron, kie mi tranoktis, ŝi varmigis tiom, ke mi ne eltenis tie eĉ du minutojn, Tuj mi diris al ŝi, ke varmas tro. Kaj ŝi respondis : *O ! Pardonu min, nepo mia, mi tutsimple pensis pri viaj leteroj, en kiuj vi skribis, ke tiom varmas en Afriko !!!* Denove ni ridadis. Ĉar mi pensas, ke se ŝi ne estus malaltiginta la varmigon, antaŭ la mateno mi estintus rostita !.

Avineto estis tiom agrabla kaj atentema al mi ! Ĉiun jaron ŝi preparis tri paketojn por mi okaze de mia naskiĝtago, okaze de Kristnasko kaj okaze de la ferioj en Betschdorf. Mi vivis hejme, kiel en la hotelo ! Mi ne scias, kiom da steloj mi povas doni al ŝi ! Iam mi restis pli ol du semajnojn. Mi memoras, ke mi neniam manĝis dufoje la saman pladon, ŝi ĉiam ŝanĝis la menuon por mi. Ŝi ege spertis ĉion prepari ame por plezurigi min. Nia rilato atingis ian novan nivelon !

Iom post iom mi iĝis konfidenculo de mia avineto. Ŝi rakontis al mi sian tutan vivon, ŝi parolis pri la naskiĝo, la milita tempo, la geedziĝo, la infanoj, la laboro en la ŝparkaso. Jes, mi mem ankaŭ rakontis al ŝi mian vivon, de la naskiĝo en la fora Kameruno ĝis la alveno en Francio. Tiel Betschdorf iĝis mia dua vilaĝo. Kiam mi estis ankoraŭ en la abatejo, ŝi volis kontaktigi min kun aliaj esperantistoj en la departemento Ardèche, sed tio ne sukcesis. Iam ŝi atendis telefonalkvokon de mi, ŝi devis samtempe tondi la herbojn, kaj ŝi vundis la dekstran manon, ĉar ŝi volis min helpi.

Kun granda ĝojo ŝi partoprenis en la granda seminario de Strasburgo en miaj festoj (*ordres mineurs*) kun aliaj esperantistoj el Betschdorf, ĝis mia diakoniĝo, kiu okazis en *St. Amarin*, sude de Strasburgo kun sia filo Raymond kaj la edzino. Verdire, Avineto konatigis min kun la tuta familio. Mi memoras, ke dum la 80-a naskiĝdatreveno ŝi volis, ke mi nepre partoprenu, kiel speciala invitito, kiel ŝia infano el Kameruno. Iam ŝi rakontis al mi, pro kio ŝi ne plu ricevis la sanktan eŭkaristion de longa tempo kaj tio estis granda ŝtono, kiun ŝi portis en la koro. Do, mi helpis ŝin renkonti la pastron, kaj finfine ŝi rekomencis la sakramentan vivon. Estis la plej bela donaco, kiun mi donacis al ŝi. Ŝi ankaŭ estis ege ĝoja, kiam en Betschdorf mi ofte invitis ŝin reciti la brevieron kun mi.

Post mia diakoniĝo, en 2002, mi reflugis al Kameruno, sed ni gardis nian ligon, ĉiam fortan ligon. Ŝi alvokis min ofte, kaj ni babilis telefone, rememorigante la belajn tagojn, *la flamkukojn*. Ŝi skribis al mi ĉiun duan semajnon, kaj kiam mi ne respondis tuj al la korespondado, ŝi diris "*senkulpigu min pro mia aŭdaco*".

Ekde 2003 mi havas la bonŝancon viziti Eŭropon ĉiun jaron. Tiujn vojaĝojn mi profitis por viziti ŝin dum kelkaj tagoj. Estis tiam granda ĝojo revidi unu la alian. Lastjare, dum la somero 2011, mi kiel kutime vizitis ŝin. Tio okazis dekon da tagoj antaŭ ŝia forpaso. Kun granda peno mi rimarkis, ke ŝi pli kaj pli maljuniĝis kaj laciĝis.

Ŝi diris al mi : "*Nepo, mia nepo, mi jam estas laca kaj volas ripozon. Mi atendas tiun momenton kaj preĝas, por ke ĝi okazu. Mi ne plu eltenas. Mi petis de Dio, ke mi ne restu en la maljunula domo, kaj tiun peton li plenigu. Mi ne volas suferi, mi ne forgesos vin !*". La lastajn jarojn ŝi malsaniĝis, oni operaciis la okulojn, la piedojn... sed tiam ŝi ne volis resti kun la infanoj, ĉar ŝi ne eltenis ke ŝi iĝu ŝarĝo por la aliaj. Ŝi tiam diris : "*Mi nenion volas, mi jam havas tro*".

Sed Avineto mortis kun vigle funkcia kapo. Ĝis sia morto ŝi havis bonan memoron. Avineto forpasis, kiam ŝi havis 89 jarojn, 11 monatojn kaj unu semajnon... Dum mia lasta visito ni parolis pri la 90-a naskiĝtago, kiu alproksimiĝis, kaj kiun ŝi tutcerte festis kun Dio kaj en Dio.

Tio estas speciala donaco de Dio, Avineto mia ! Ripozu en paco apud la Eternulo. Mi ne laciĝos preĝi por vi.

Nepe via !

Pastro Gabriel ANDA

forpaso



Nia amikino **Manette Bernardin**, de *Epinal* forlasis nin... Ŝi mortis la 27an de aŭgusto 2012. Ŝi estis tre aktiva esperantistino, kiu donis kursojn de esperanto en Epinal dum pluraj jaroj. Ŝi partoprenis en pluraj aranĝoj organizitaj de la orient-francaj esperantistoj, ankaŭ en kelkaj organizitaj de la germanoj, sed ĉefe ŝi mem organizis plurajn tre interesajn esperanto-renkontojn en la *ĉaledo de naturamikoj de Bouzey* kaj en la *ĉaledo de naturamikoj de La Schlucht*. Ĉiam ni multe ludis kaj kantis, kiam okazis renkonto organizita de ŝi.

Laŭ mi, la plej spektakleca afero estis, kiam okazis la milito en Irako. Ŝi partoprenis en Epinal en defilado kontraŭ la milito kun sia grupo, kun banderolo sur kiu estis skribita "*Ne al la milito*"

...

La morgaŭan tagon, la ĵurnalo *L'Est Républicain* havis grandliteran titolon en esperanto "**Ne al la milito**"... Mi kredis revii, kiam mi vidis la titolon. Neniam antaŭe kaj neniam poste mi vidis similan titolon en esperanto en nia regiona ĵurnalo. Manette faris miraklojn. Ve, ŝi tiom mankas al ni!

Ginette MARTIN

Diskrete, "Manette" forlasis nin...

Vere, ŝia antaŭnomo estis Marie-Antoinette sed, de longtempe, ŝiaj multaj geamikoj nur konis "Manette" ... Kiel bubleernej-estrino en Epinal, de siaj etaj gelemantoj ŝi estis adorita, kaj ĉiam aprecita de la kolegoj. Manette trafis praktikis *Freinet pedagogion*, havis respondecon meze de movado *Naturamikoj*, kaj flue parolis nina internacian lingvon.

Ŝi vizitis landajn kaj internaciajn kongresojn, kaj akurate, ek de pluraj jaroj, enpartoprenis Eo-kursojn en Bouvacôte. En Epinal, ŝi gvidis unuagradan kurson por adoltoj. Ofte, en Bouresse, ŝi ŝategis staĝi pri muziko, ĉar Manette kantis, ĉu franclingve, ĉu esperantlingve.

Antaŭ kelkaj jaroj, ŝi ne plu rekonis la vojon al Bouresse, ŝi dormis en sia aŭtomobilo kaj, finfine, reveturis hejmen... Terura malsano Alzheimer malsano detruis iom post iom ŝian cerbon.

Hodiaŭ, ni ĉiuj multe ĉagrenas, sed en niaj okuloj revivos la memoro de tiu amikino, ĉiam vigla, ĉiam ridetema. Ŝi restos nia sincera kaj sindonema samideanino... sed bedaŭrinde Manette ne plu kantos...

Al Andreo, Ĝhislaine kaj al la familio, ni kondolencas.

Robert COLIN

Salutmesaĝo de L.C. Zaleski-Zamenhof al la 97-a Universala Kongreso

« Estimata Sinjorino Alta Protektanto, Sinjoro Prezidanto, Estimataj Gekongresanoj, Geamikoj tre karaj,

Vi kunvenis laŭkutime en la centro de Esperantujo, situanta ĉi-jare malproksime laŭ distanco, tamen ĉiam proksime al mia koro.

Dum via Kongreso vi debatos pri la ponto al paco, al amikeco kaj al disvolviĝo, temo por mi, ponto-konstruisto, aparte interesa, precipe pro la nomo de tiu ponto: Ponto Esperanto !

Tial mi komprenis, ke elektinte siatempe mian inĝenieran profesion, mi neniel perfidies la kuracistan tan tradicion de la familio. Ne, mi ĝuste sekvis la Avon, kiu ja prezentiĝas kiel la inĝeniero de tiu Ponto...

Laŭ ekzistanta tradicio, la inĝeniero staras sub sia ponto, kiam la unua trajno aŭ la unua ŝarĝaŭto ĝin trapasas. Mi ĉiam sekvis tiun tradicion kaj mi konsideras, ke sekvis ĝin ankaŭ mia Avo. Ĉar li daŭre estas vivanta en la koro de ĉiu esperantisto, ni povas konkludi, ke la Ponto Esperanto neniam rompiĝis kaj daŭre nin kondukas al paco kaj amikeco !

Mi forte deziras al la Kongreso, ke ĝiaj debatoj estu fruktodonaj kaj kreu favoran eĥon tra la mondo ».



« Vous êtes réunis comme à l'accoutumée au centre de l'Espérantie, éloigné cette année selon la distance, mais cependant toujours proche de mon cœur.

Au cours de votre Congrès, vos débats vont porter sur le thème du pont pour la paix, pour l'amitié et son développement, thème qui pour moi, constructeur de ponts, s'avère spécialement intéressant, surtout à cause de cette dénomination, *Pont de l'Espéranto* !

C'est pourquoi j'ai compris qu'en choisissant alors ma profession d'ingénieur, je n'ai en aucune façon trahi la vocation traditionnelle de la famille pour l'art médical. Non, j'ai suivi exactement la voie de mon Grand-Père, considéré en effet comme l'ingénieur de ce *Pont*.

Selon une tradition courante, l'ingénieur se tient sous le pont dont il est l'architecte, lorsque le premier train ou le premier poids lourd l'utilise. J'ai constamment obéi à cette tradition et je considère que mon Grand-Père s'y est également soumis. Comme il reste vivant dans le cœur de chaque espérantiste, nous pouvons conclure que le *Pont de l'Espéranto* ne s'est jamais rompu, continuant à nous mener vers la paix et l'amitié.

Je souhaite vivement au Congrès des débats fructueux susceptibles de susciter dans le monde un écho favorable ».

Libera traduko : DP

Centre culturel de GRESILLON - Kulturcentro GREZILJONO ===== AŬTUNE, la ferioj =====

Enfants, jeunes, petits et grands-parents, musiciens en herbe avec ou sans leur propre **instrument**, débutants et confirmés, espérantistes ou **pas**...

... venez individuellement ou avec toute la **famille**, pour passer ensemble les vacances

du 27 oct. au 3 nov. 2012

+ Covoiturage (également au stage d'*Interkant*)

+ Detaloj en Esperanto en gresillon.org/autune

+ Détails dans gresillon.org/automne

COURS Svetlana Smetanina (Russie) *Cours de conversation pour élèves avancés*
Bert Schumann (Allemagne) *Méthode Cseh, méthode directe en espéranto, pour vrais débutants*

ACTIVITÉS

Kees Ruij (Pays-Bas)

Atelier d'improvisation musicale avec vos instruments

Bert Schumann (Allemagne)

Activités récréatives diverses pour enfants jusqu'à 99 ans

Kees Ruij (Pays-Bas)

Atelier Mantra : fais connaissance avec ta voix

Svetlana Smetanina (Russie)

Conférences autour son grand pays

Daniel Durand (France)

Quel espoir au Rwanda et à l'Est de R.D.Congo ? (diaporama et témoignage)

CONCERTS

Marielle Gazelle (France)

Chansons Sucrées Salées

Kes Ruij (Pays-Bas)

Concert de musique populaire à l'accordéon

HANOJO

97-a Universala Kongreso de Esperanto

Rezolucio

125-jara, Esperanto konstruas pontojn al pli justa kaj paca mondo

Kunvenante en Hanojo, Vjetnamio, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012, pli ol 800 partoprenantoj el 62 landoj en la 97-a Universala de Esperanto rekonfirmas la gravecon de la lingvo konstruita sur la idealoj de paco, amikeco kaj reciproka respekto.



Por homoj el ĉiuj landoj kaj vivofonoj, Esperanto proponas praktikan kajpotencan rimedon por rekta kontakto, reciproka interkonatiĝo kaj profunda amikiĝo.

Por mondo kie ankoraŭ abundas konfliktoj kaj maljustaĵoj, Esperanto proponas kulturon de paco, kiun kunkonstruas en egaleca etoso homoj el ĉiuj kontinentoj.

Por internacia komunimo kiu klopodas realigi la Jatmilajn Evoluigajn Celojn de Unuiĝintaj Nacioj, Esperanto proponas kompletigan evoluvojn al tutmonda partnereco, en kiu kunlaboras ne nur ŝtatoj kun ŝtatoj, sed homoj kun homoj.

125 jarojn post sia apero Esperanto estas ĉiam pli vaste uzata kiel ponto al amikeco, paco kaj disvolviĝo - evoluo akcelata per la disvastiĝo de alia tutmonda komunikilo, Interreto. Tion oni vidas interalie per la ĉi-jara aldono de Esperanto kiel 64-a lingvo en la ret-tradukiloj de Google.

Ni invitas homojn el ĉiuj landoj utiligi kaj kunkonstrui tiun ponton, cele al pli justa kaj paca mondo, kie disfloras ĉiuj lingvoj kaj kulturoj.

=====

125 ans après son lancement, l'espéranto construit des ponts vers un monde plus juste et plus pacifique.

Réunis à Hanoï du 28 juillet au 4 août 2012, plus de 800 participants en provenance de 62 pays ont confirmé l'importance de l'utilisation d'une langue construite sur les idéaux de paix, d'amitié et de respect mutuel.

Pour des personnes issues de pays et d'horizons sociaux les plus divers, l'espéranto propose un outil pratique et performant pour des contacts directs menant à la découverte de l'autre et à de profondes amitiés.

Pour un monde où abondent encore les conflits et les injustices, l'espéranto propose une culture de paix à laquelle contribuent des hommes et des femmes de tous les continents dans un esprit de collaboration équitable.

Pour la communauté internationale qui s'efforce d'atteindre les Objectifs du Millénaire pour le Développement, buts fixés par l'ONU, l'espéranto propose une voie intéressante pour un partenariat mondial au sein duquel collaborent non seulement des Etats avec des Etats, mais des personnes humaines avec des personnes humaines.

125 ans après son apparition, l'espéranto est de plus en plus utilisé comme pont vers l'amitié, la paix et le développement ; cette évolution est accélérée par l'extension d'un autre moyen de communication mondial : Internet. On peut le constater entre autres par l'ajout de l'espéranto comme 64e langue dans l'outil de traduction de Google.

Nous invitons tous les citoyens et citoyennes de tous les pays à utiliser et à consolider ce pont, dans le but de créer un monde plus juste et plus pacifique où s'épanouissent et cohabitent toutes les langues et toutes les cultures.

=====

Denove la jara **Universala Kongreso de Esperanto** en Reykjavik 20 - 27 julio 2013

En 1977 la ĉefurbo de Islando gastigis la 1199 enpartoprenantojn de la monda evento.

Anekdot: la unua islandano en UK (Kembriĝo 1907) verkis la unuan lernolibron de esperanto en 1909. Islanda Esperanto-Asocio (IEA) fondiĝis en 1950.

« Reykjavik » signifas « vaporgolfeto », pro la varmaj fontoj, kiuj nun hejtas la domojn de la urbo.



el niaj arkivoj pri iu eminenta Lorenano, Henri POINCARÉ



En cette fin du 19^{ème} et ce début de 20^{ème} siècle, le médecin et linguiste polonais Lejzer Ludwik ZAMENHOF met au point l'Espéranto. Son grand dessein est de relier les hommes par-delà les frontières et les barrières linguistiques. Les élites scientifiques adhèrent à cet ambitieux projet.


Sises à Nancy en zone frontalière, les communautés médicales de l'Est de la France, fortes de ses nombreux réfugiés, apportent un appui sans réserve au programme de Zamenhof. Les réunions nanciennes sont très courues et l'assistance compte dans ses rangs moult médecins de " ***l'Ecole de Nancy*** " *.

* *L'appellation Ecole de Nancy qualifie les médecins célèbres tels les grands professeurs Lièbault, Bernheim, Vuillemin, Hergott, Spillmann et quelques autres. Freud lui-même vient à Nancy assister aux conférences des Maîtres. Ce n'est que plus tard que les artistes de l'Art Nouveau associeront leurs noms à cette dénomination à l'instigation de Gallé. Alors, rendons à César...!*

Le **Groupe Médical Espérantiste de France** organise son congrès mondial. Celui-ci se déroule **sous la Présidence de Zamenhof en personne** avec la participation de la *Société Française de Physique*, de la *Société Internationale des Electriciens*, des Professeurs Adelsköld, Appell, d'Arsonval, Baudoin de Courtenay, Becquerel, Berthelot, Bouchard, Deslandres, Duclaux, Förster, Haller, **H. Poincaré**, Ramsay, Général Sebert, etc.

riĉiĝas la reta kinejo de UEA


La muzika ensemble ***Amindaj*** gajnis grandan popularecon per siaj koncertoj en la 95-a UK kaj 67-a IJK en Kubo en 2010.



Intertempe aperis ankaŭ ĝia unua kompakta disko ĉe *Vinilkosmo*. Nun ankaŭ tiuj, kiuj ne spertis la grupon en viva koncerto, povas spekti ĝin en la ***Reta Kinejo de UEA***, por kiu *Francisco L. Veuthey* registris ĝian prezent-adon en la 67-a IJK.

Amindaj estas kultura projekto, kiu kombinas la tradician muzikon kaj dancojn de Kubo kun Esperanto. La grupo fondiĝis en 2009 en la urbo *Contramaestre*. Ĝin iniciatis *Graciela Morgado Rodríguez*, kiu kunmetis grupon de junaj esperantistaj muzikstudentoj kaj liberaj muzikistoj.

Plimulto de la kantoj de *Amindaj* estas verkitaj, komponitaj kaj adaptitaj de *Julián Hernández Angulo*. Aliajn kantojn adaptis *Maritza Gutiérrez González*. *Amindaj* utiligas tradiciajn kubajn instrumentojn.



Osmo Buller

antaŭ 125 jaroj ...
... tiam naskiĝis Esperanto ! ...



La 26an de julio 1887, post multaj malfacilaĵoj, inter kiuj cenzuro kaj mon-obstakloj, tiuj lastaj solvitaj dank'al sia onta bopatro, Ludwik Lejzer Zamenhof sukcesas aperigi la unuan broŝuron en rusa lingvo sub la titolo *Lingvo Internacia*.

Je tiu dato li adoptas la pseŭdonimon *Doktoro Esperanto*.

Iom post iom atingas lin adresoj de adeptoj kaj subtenantoj, 5567 en 1900, 13 103 en 1905.

De la 5a ĝis la 12a de aŭgusto 1905, Boulogne-sur-Mer akceptos la unuan *Mondan Kongreson de Esperanto* kun 688 partoprenantoj.



Dum tiu evento pruvigis, ke la lingvo, ĝis nun preskaŭ nur skribita, estas vera parolata interkomunikilo.

Greziljono jubileis !

Forflugas lajaroj, sed fidelas la memoro !



Jen kio pensis la "veteranoj", kiuj revizitis la kastelon dum tri tagoj, 30-a de junio /1-a de julio, por festi la 60 jariĝon de la Kulturcentro... Ne nur veteranoj, ĉar miksiĝis pluraj generacioj, kiuj ĝoje aprexis la riĉan programon ellaboritan de la aktuala skipo, kiu strebas daŭre vivigi Greziljonon.

Fakte tamen, ne multnombraj estis la "samideanoj", kiuj alportis siatempe sian helpon ĉefe financan al Henri Micard en la jaro 1952, kiam oficialiĝis la naskiĝo de la fama Centro.

Malfacilas citi ĉiujn erojn de la aludita programo ! Memevidente svarmis babiladoj ĉiutemaj kaj tiu "zumado" en la salonoj pruvis la vivantecon de nia dua lingvo !

Elstaris interalie filmo, ĉefe nigreblanka, kiun spektis atente ĉeestantaj iamaj gastoj, eĉ se mutis la aktoroj sur la ekranu ! *"Nu, vidu, jen mi, maldekstre, kun larĝe malfermita ĉemizeto !... Ĉu ne Roberto, sidanta apud Johanino ?... Kaj la plaŭdanta knabo en la naĝejo, divenu pri kiu temas ?..."*



Ĉu ne menciis speciale la bankedon post tradicia kaj vere saliviga aperitivo, festivalo de bongustaĵoj multkoloraj, ne nur aprexitaj de la "vegetaranoj"!

Ŝoviĝis en la programon koncerto de Jak Le Puil, akompanata de la kontrabasisto Pier Buvje.

Kiamaniere elvoki originale la Jubileon ? Jen, fronte al la majesta fasado, ellaso de 60 balonoj, kiuj baldaŭ punktos diverskolorre la bluan ĉielon ! Neforgesebla sekvenco, kiun kaptis dekoj da fotoj !

Certe grumblus la organizantoj, se ni ne aludus la vigran membro-kunvenon, dimanĉon matene, kiu debatis pri la kutimaj problemoj ligataj al la pasinta kaj futura vivo de la kastelo...


... / ...

Oni permesu al la aŭtoro de ĉi-tiu raporto elvoki kelkajn memoraĵojn koncerne travivaĵojn dum liaj pluraj ĉeestoj en la domo. Helpo al Ribot, kiu siatempe uzis sian modernan kurson por komencantoj...



Kelkajn jarojn poste, trapaso de la tiama "Kapableco"... Ankoraŭ pli malfrue, ŝvito - duobla, ĉar freneziĝis la termometro - dum ellaboro de disertacio en la kadro de la "Altaj Studoj"... Nu, mi devis doni mian opinion pri la romano de Spomenka Ŝtimec, *Ombro sur interna pejzaĝo*, kun specifa demando, "Ĉu temas pri vera amo" ? ...

Jen okazo por aludi laboron de unu el la labor-abelulinoj, kiu ofte kaj longtempe kontribuis al la bona funkciado de la kastelo ... Multaj el ni memoras ja pri Jeanine Vincent ! Jen neforgesebla ulino kun faka personeco ! Ŝi daŭre grumblis kontraŭ mi, kiu rezignis pri trapaso de la parola parto de la *Alt.St.* ... "Ĉu vi ne hontas resti duondiplomito ?... ". Mi ne rezistos liveri alian anekdoton... Okazis granda kunveno en la domo. Ŝi certagrade malfruis por enpartopreni la tag-manĝon, kaj ĉirkaŭokulumis por detekti liberan seĝon... Bedaŭrinde, restis nur tiu fronte al mi ! Ŝi severe mienis, sidiĝis kaj deklaris... "Sinjoro D, mi avertas vin, ke mi ne suferos viajn humuraĵojn, mi ja sper-
tas pezan kapdoloron !" ... Jen Jeannine !



... / ...

Sed mi ne tedu la legant(in)on ... Restas al mi emfazi pri la daŭre allogaj programoj proponitaj dum la tuta jaro de nia Kulturcentro. Enpartoprenu ilin !

Fotoj M A-T kaj DP

P. Denis

97-a UK 2012 en Hanojo



Estis preskaŭ 900 kongresanoj el iom malpli ol 60 landoj, kiuj venis al Hanojo por ĝuis vere eksterordinaran kaj elstaran kongreson. En la urbo, en la ĉirkaŭaĵo de la kongresejo troviĝis tiaj vertikalaj flagoj por informi pri Esperanto en la vjetnama lingvo. Ankaŭ horizontalaj banderoloj pendis super la stratoj.



Okaze de la movada foiro, kiu okazis en la unua vespero, grupo da vjetnamaj ĝejnuloj kantis kaj vigle kaj amuze prezentis iom da Esperanto-gramatikaĵoj.

Vjetnamio kaj ĉefe Hanojo akceptis tiun 97an Universalan Kongreson. Melia Hotelo estis tute oportuna kongresejo. Tamen la vesperaj programoj okazis en la Universitato de Hanojo. Tiam necesis uzi la aŭtobusojn metitajn je dispono de la kongresanoj



Ĉina grupo el la regiono de Hunan prezentis sian flagon kaj siajn membrojn

La Movada Foiro estas okazo por diversaj asocioj landaj aŭ fakaj sin prezenti al la ceteraj kongresanoj, montri sian aktivaĵojn, eldonaĵojn kaj allogi al renkontiĝoj. La partoprenanoj povas iom taksii la vastecon kaj diversecon de la Esperanto-movado.

Krome pluraj junulaj grupoj agrabligrigis la vesperon per kantoj.



Dimanĉe okazis la solena malfermo de la kongreso kun komitatano sur la podio. Dum la paŭzo plaĉaj dancgrupoj da ĝejnuloj montris siajn talentojn kaj plezurigis la ĉeestantojn dezirante sukceson al tiu 97a UK en Hanojo.





Multaj landaj reprezentantoj venis por transdoni siajn salutojn al la kongreso, laŭ la planita tempo. Finiĝis la oficiala malfermo de la kongreso, leviĝis la podianoj kaj la publiko por kune kanti la himnon.



Unu el la teatraĵoj estis la monologo Tiradentes. Temis pri plej elstara brazila heroo por la sendependigo de Brazilo de Portugalio. Amanho Hêvia de Carvalho, brazila veterana esperantisto, kun emocio rakontis pri la vivo kaj la batalo de tiu heroo kontraŭ la regado de reĝino Maria la Unua en Portugalio. Pro sia aŭdaco li estis mortkondamnita kaj kiel "ekzemplo" por la aliaj. La publiko ĝuis ege talentan aktoron kun klara prononco de Esperanto. Varmajn aplaŭdojn li ricevis.

Proksimume 200 kongresanoj estis invititaj de la urbaj instancoj al granda salono de restoracio. La akcepto komenciĝis per bonvenigaj salut-vortoj. Poste eblis ĝui agrablan prezentadon de muzikistoj, gedancistoj. Post tiu enkonduka spektaklo estis servita bankeda manĝo. Dume agrablaj konataj muzukaĵoj plezurigis la ĉeetantojn.



La oratoran konkurson partoprenis 7 kandidatoj el 6 landoj.

La unuan premion ricevis Michael Boris Mandirola (Italio), kiu verve oratoris pri la temo "esperanto en Interreto". La dua premio iris al Rafael Enrique Zerbetto (Brazilo), kiu elektis la temon "Esperanto – ponto al paco, amikeco, kaj disvolviĝo", kiu ankaŭ estas la kongresa temo. Trian premion ricevis Lee You-Kyung el Koreio; ŝi teatrece parolis pri "la drako: ĉu timiga, ĉu alloga simbolo?" Honoran mencion ricevis Jérémie.

NHỆ NHỊ - THÂN PHỐ HỒ CHÍ MINH
Nhiệt liệt chào mừng các nhà Quốc tế ngữ
thế giới đến với Việt Nam

Hanojo - la Urbo por Paco
Ŭarman bonvenon al la esperantistoj el la tuta mondo en Vjetnamio

Hanojo 02/8/2012


Kính tặng
 Donace de la Popola Komitato de la urbo Hanojo
 al la kongresanoj de UK-97

Ĉe la forlaso de la salono ĉiu gasto ricevis donace grandan vazon (alta je 36 cm) kun surskribo en la vjetnama kaj en Esperanto.



La kursoj de Katalin Kováts estas ĉiam tre sukcesaj. Ŝia pedagogio allogas ne nur komencantojn, sed ankaŭ progresantojn kaj eĉ observantojn, kiuj deziras inspiriĝi de ŝia talento. Ŝi sukcesas krei veran entuziasmon ĉe la partoprenantoj, kio cetere ankaŭ kontribuas al la sukceso de ŝiaj kursoj.

Ĉe la fino de la kurso ŝi menciis la retejon www.edukado.net



La 9an de junio 2012 okazis tutmonde la 29 KER-ekzameno-sesioj en 25 diversaj landoj en pli ol 20 urboj kaj partoprenis je 3 niveloj (B1 - B2 - C1) 978 personoj. Okaze de la kongreso en Hanojo okazis la parola parto de tiuj ekzamenoj. Krome Katalin Kováts kunportis al Hanojo diplomojn de sukcesintoj kaj partoprenantoj de UK. Tie okazis la oficiala transdono de la diplomoj al entuziamaj kaj feliĉaj sukcesintoj. Ankaŭ ĝi estas granda sukceso por la organizantoj de tiuj Ker-ekzamenoj.



Raporto kaj fotoj de Andreo kaj ties komputilo



La fermo de la kongreso okazis en granda entuziasmo, kiun transdonis vjetnamaj gejunuloj al la ceteraj partoprenantoj. Ni deziru al ili riĉigan estontecon en la Esperanto-movado.

Postkongreso tra Vjetnamio kaj Kamboĝo

Post la kongreso en Hanojo estis proponitaj 2 Postkongresoj tra Vjetnamio kaj Kamboĝo. La 5an de aŭgusto, frue en la mateno, ĉiuj partoprenantoj kolektiĝis en la halo de la kongresa hotelo Melia Hanoi. La celo estis flugi al pli suda urbo Hue.

Hue estas la malnova imperia ĉef-urbo de Vjetnamio (1802-1945). Ĝi troviĝas en la centro de la lando iom sude de la 17a paralelo proksime de la maro. La riverego Sông Hương (parfuma rivero) apartigas la malnovan urbon norde de la pli moderna sude. La reĝa citadelo estas impona konstruaĵo de la 19a jarcento, ĉirkaŭata per larĝaj kanaloj. Post vizito al la Pagodo Thien Mu estis proponita vesper-manĝo dum ŝipoeturado sur la parfuma rivero. Ĝi estis tute trankvila kaj sur ties surfaco floris kandeloj. Dume sur la ŝipo eblis aŭskulti reĝan kortan muzikon.



Impona reĝa citadelo



Vizito al Thien Mu Pagodo



Survoje al ŝip-veturado. Du ŝipoj kune navigis sur la parfuma rivero por ĉiuj postkongresanoj.

Muzikistoj sur la ŝipo, kiu trankvile navigis



En posta mateno vizito al la tombo de la reĝo Tu-Duc







De Hue al Hoi An ni transiras de norda al suda Vjetnamio. Proksime de la 17a paralelo troviĝas tiu gardo-turo. Dum mallonga paŭzo eblis ĝui la strandon kaj varman akvon de la maro.



En la vilaĝo Thanh Ha abundis skulptaĵoj kaj ceramikaĵoj. Supre de la monto en groto troviĝas tiu budao. Sed ja necesas suprengrimpi multajn malregulajn ŝtupojn antaŭ ol atingi la groton.



Malgrimado estis eĉ pli malfacila




En la sama vespero la tuta grupo flugis al Ho-ĉi-min-urbo. Aparte interesa estis la vizito al la tuneloj Cu Chi. Maldika soldato montras, kiel li enŝoviĝis en la tunelon kaj poste fermis ĝin.



Kaptilo kun pluraj pikiloj.



Sur la stratoj de Hanojo kaj Hoĉimin-urbo svarmas skoteroj, kelkfoje 4-ope kun 2 personoj kaj 2 infanoj. Aŭtomobiloj estas malpli abundaj. Proksime de granda bazaro abundas strat-vendistinoj, kelkfoje iom arogantaj.



La vjetnama lingvo estas skribata per latinaj literoj kun pli ol 40 surper-signaj literoj. Malmultaj vortoj similas al iu eŭropa lingvo. Tamen, jen kiel skribi la vorton "kafo" en la vjetnama.

La reunigita palaco en la proksimeco de Hoĉimin



La lasta etapo de nia postkongreso estis Kamboĝo, la urbo Siem Reap. En la proksimeco troviĝas la mirindaj temploj Angkor Wat kaj Angkor Thom, kiujn ni sukcesis nur parte viziti. Tie abundas turistoj el multaj landoj, aziaj kaj eŭropaj. Turismo estas tuta industrio kun multaj luksaj hoteloj, aŭtobusoj. Aliflanke ĉe la eniro de la temploj abundas insistemaj strat-vendistoj, plej ofte eĉ infanoj.



En Kamboĝo estas uzata la kmera lingvo kun kmera alfabeto.

Eĉ ciferoj estas aliaj, kiel montras tiu "kalkulilo" en Kultura Vilaĝo, kiun ni laste vizitis en la proksimeco de nia hotelo.

Tie ni povis ĉeestis kmeran geedziĝan ceremonion kaj admirati la arkitekturon de diversaj etnoj en Kamboĝo..



Raporto kaj fotoj de Andreo

niaj legantoj kontribuas !

tiun bildstrion (n°1) talente verkis Armand HUBERT

NADZJEJA

« Nadzjeja » signifas « espero » en la pola. Ĝi estas serio da bildstrioj, kiu pritraktas devojitan, nuntempan mondon.

S-ino Margaret Thatcher -eksa ĉefministro de Britio- vortumis la situacion en franca revuo *Marianne* tiele : « *Je la fino de la XX-a jarcento postrestas unu militpotenco, tiu de Usono, - funkcias unumura sistemo, la liberala ekonomiko de Usono kaj Britio, - valoras unumura lingvo en la mondo, la anglo-usona.* ».

Nadzjeja, praktikanta Esperanton, vortumas sian pritakson de tia politikista juĝo.

Armand HUBERT



NADZJEJA (*)

- 1/4


Babilema,
amikecema,
almond fervora,
praktikanta
Esperanton,

(*) « ESPERO » en la pola

beleta,
(ĉu ne ?)
decidema,
moderna,
postulema,
instiganta
ŝanĝojn.


Fronte al

reganta



OKCIDENTO

super



TRIA MONDO

... kiel junulino,
ŝi sentas sin
sorgoplenan
pri l'estonto !



Mi denuncas
eksploatadon,
malriĉigadon,
humiligon,...
de iu ajn homarano !



ESPERANTO edukas
al plia respekto de aliulo.

A.Hubert


NADZJEJA

- 2/4

Pri
VAŜINGTONA
INTERKONSENTO :


Memorindaĵo :

« Ek de la komenco, submetitaj popoloj klopodis lerni la lingvon de la gajninto kaj sekvi ties vivmanierojn. » (Ibn Khaldun / XIV-a)




Adekvataj ĉapeloj tiucele disdoniĝas ĉi-tempe.

« Ununura lingvo
valoras
en la mondo. »



ne povas anstataŭi
regantan lingvon, sed ...

...
per Ĝi
eblas
eskapi
al
postulata ununureco.



Nadzjeja ne akceptas ĉapelon.



A.Hubert

dans notre rubrique - Un argumentaire ...

NB de la rédaction : *une démonstration originale de Marc Rousset : la défense du français par le biais de l'adoption de l'espéranto sur le plan européen. Des lecteurs nous feront remarquer que la vocation de l'espéranto est de devenir une langue seconde à l'échelle mondiale. Par ailleurs nous laissons naturellement à l'auteur la responsabilité de tenir certains propos qui pourront paraître excessifs.*

Non seulement la France ne fait rien pour défendre l'espéranto qu'elle a voulu tuer en 1922 à la SDN à Genève avec son Ministre Gabriel Hanotaux, alors que l'espéranto était sur le point d'être adopté à une très large majorité, mais elle le combat toujours !!! Aujourd'hui la France s'oppose à ce qu'on puisse présenter l'espéranto au baccalauréat français comme langue facultative et optionnelle, alors qu'il est possible de présenter le provençal et même le ... croyez vous, le berbère, qui n'est pourtant pas une langue européenne !!! A l'époque, en 1922, l'attitude de la France était compréhensive car le français était la langue universelle.!

Depuis, les temps ont changé! La France a perdu, suite à la trahison de ses élites, la bataille du français et du multilinguisme à Bruxelles ! Elle se fait tondre tous les jours de la laine sur le dos par l'anglo-américain, ce qui aboutira d'ici un siècle, si rien ne change, à une nouvelle Louisiane ou à la régionalisation, puis la disparition à très long terme de toutes les langues nationales européennes. L'Eurocorps, où il n'y a pas un seul soldat britannique parle anglo-américain! La BCE à Francfort, alors que les Anglais ne font pas partie de la zone euro, parle anglo-américain ! Airbus, une magnifique réalisation économique franco-allemande, parle aussi anglo-américain ! Et les militaires français rêvent aujourd'hui de faire carrière dans l'OTAN en anglo-américain, comme les cadres des sociétés multinationales ... Où va-t-on !!!

Une seule façon d'éviter cela et de défendre les chances du français ... Introduire en Europe l'espéranto, langue neutre et éthique, sept fois plus facile à apprendre que l'anglo-américain et qui battra cette langue allemande bâtardisée parlée par le peuple anglais du XI^{ème} au XV^{ème} siècle et donc simplifiée !! Le français a été en effet la langue officielle de l'Angleterre pendant ces 4 siècles, d'où la devise de la monarchie britannique : "Dieu et mon Droit".

L'espéranto battra inéluctablement l'anglo-américain sur son propre terrain de la facilité et de la simplicité, avec le même succès que le système métrique introduit par Talleyrand lors d'un discours à la Convention en 1792. Le premier pays après la France à adopter le système métrique fut la Hollande en 1816 et aujourd'hui même les Etats-UNis sont obligés de tenir compte du système métrique !!

Rien n'empêchera d'avoir un jour une littérature en espéranto puisqu'il fut un temps où ni le français (*Serment de Strasbourg*), ni l'anglais n'existaient !!

L'espéranto n'est pas plus artificiel que le français qui a été retravaillé par Malherbe, l'italien par Dante et l'allemand par Luther ! L'indonésien a été créé de toutes pièces à partir de langues régionales indonésiennes ! Même chose pour le Norvégien, un commun dénominateur de diverses langues locales en Norvège. ! Et que dire de l'hébreu parlé aujourd'hui en Israël, langue bien vivante aujourd'hui, qui n'existait pas et n'était parlée par personne lors de la création de l'Etat d'Israël !

Aujourd'hui plusieurs millions de personnes parlent déjà l'espéranto dans le monde et vous pouvez regarder tous les jours le journal télévisé en espéranto sur une chaîne de télévision chinoise!

Au lieu d'avoir un "*Basic English*" comme espéranto, mieux vaut avoir l'espéranto proprement dit comme langue utilitaire, neutre, éthique de communication. Lorsqu'un Français, un Anglais et un Américain parlent espéranto, chacun doit fournir un effort semblable, car celui qui parle sa langue nationale jouit sinon d'un privilège inacceptable. 60% des racines de l'espéranto sont latines, avec de nombreux emprunts aux langues vivantes européennes!

Le multilinguisme seul ne suffit pas! Les armées de Byzance étaient commandées en latin ! Dans une armée, européenne pour communiquer efficacement entre plusieurs nationalités, il faudra bien parfois une langue commune. pour les Européens, cette langue, neutre, éthique, facilement compréhensible ne peut être que l'espéranto!

L'espéranto contribuera donc au multilinguisme et à la défense, à la survie à terme de la langue française et de toutes les langues nationales ou régionales en Europe !



La presse et l'espéranto

le journal

DE SAÛNE-ET-LOIRE

SAINT-REMY LINGUISTIQUE

Echanger sans frontières

Langue de plus en plus parlée dans le monde, l'espéranto reste méconnu en France.

Rencontre avec une passionnée.

Jocelyne Monneret accueille des espérantistes
comme ces Slovaques venus en vélo. Photo DR



Jocelyne Monneret a découvert cette langue par l'intermédiaire d'une collègue institutrice qui la pratiquait en correspondance scolaire.

Depuis 1997, elle n'a cessé de s'investir en faveur de l'espéranto : « *J'ai trouvé que c'était extraordinaire, je me suis mis à l'apprendre* ».

Au fil de son apprentissage, de ses lectures, de ses rencontres, elle est devenue une véritable ambassadrice de l'espéranto, participant à des congrès internationaux à travers le monde entier.

Un apprentissage simplifié. Cette langue a été mise au point à la fin du XIX^e siècle par le docteur Zamenhof. Il vivait en Pologne, où la population était multiethnique, et voulait se servir de la communication pour faire progresser des idées de paix. : «

L'espéranto a été construit pour que les gens qui ne font pas d'études, qui n'ont pas de temps, puissent correspondre » souligne l'ancienne institutrice. L'inventeur polonais a ainsi utilisé les racines communes des différentes langues européennes afin de former le plus de mots possible. La grammaire est simplifiée (16 grandes règles) et les exceptions sont inexistantes : « *C'est un peu comme un jeu de lego, des préfixes et suffixes s'ajoutent, cela fait une grande économie pour la mémoire* ».

Une utilisation élargie. Pourtant peu connue, la langue espéranto trouve une assise internationale grandissante. Elle est désormais enseignée en Hongrie, admise comme langue de tourisme au Brésil et répandue dans le périscolaire en Chine.

En France, quelques sites touristiques proposent des brochures en espéranto. Actuellement, la langue n'est pas dans le programme d'enseignement, elle est juste proposée en annexe dans des clubs extrascolaires pour mener de la correspondance.

Un réseau d'associations se bat pour faire figurer au baccalauréat l'espéranto. Une campagne de sensibilisation et de pétition est menée jusqu'à fin septembre et a déjà vu des grands noms, tels qu'Albert Jacquart, se mobiliser en faveur de la langue. « *Cette campagne n'a pas pour but d'imposer l'espéranto, défend Jocelyne Monneret, juste que le ministre la mette en option facultative* ».

Les voyages et les rencontres sont un véritable leitmotiv pour la San-Rémoise. Elle figure d'ailleurs dans un annuaire regroupant les espérantistes du monde entier et les accueille régulièrement. Si l'aventure vous tente, sachez que l'on peut avoir un niveau baccalauréat en seulement 150 heures et que des cours sont disponibles gratuitement sur internet. L'évasion semble-t-il, n'a pas de prix.

Pétition disponible sur www.esperanto-au-bac.fr

66-a Kultura Semajnfino
de SARLANDA ESPERANTO-LIGO
19/21ajn de oktobro

« Kardinal-Wendel-Haus » - DE - 66424 Homburg / Saar
petu informilojn kaj invitilon ĉe
sel@esperanto-reto.eu

ĉu " fruktodona " polemiko ?

(NB el la redaktejo - la ĉi-suba retmesaĝo aperis en la diskutlisto satamikaro@googlegroups.com

Kulpas ni pri la decido ne indiki la redaktinton...

Ni taksis oportuna aperigi poste du mesaĝojn de « reagantoj »).

"Inter samlingvanoj, absurde estas paroli Esperanton, kies ekzistokialo estas internacia komunikado. Ĉar ni parolos nun pri seriozaj aferoj, por kiuj necesas, ke ĉiu membro povu kompreni ĉion, kio estas dirita, doni sian opinion kaj konscie voĉdoni, ni nun plu diskutos nur en nia nacia lingvo, kaj lertaj esperantistoj inter ni estas amike sed firme petataj fari same."

... / ...

1



- « Tiuj du geniaj principoj sekure fabrikas eternajn komencantojn, kiuj propagandas pretendite facilan lingvon, kiun ili mem ne kapablas uzi...

Por lerni lingvon kaj same por ne forgesi ĝin, necesas praktiki ĝin. Franclingvano, mi ne bezonas asocion por praktiki la francan lingvon, kiun mi vole nevole konstante uzas de la mateno ĝis la enlitiĝo. Kiam mi estas tute sola (tio okazas pli kaj pli ofte pro mia maljuniĝo), mi pensas en Esperanto por praktiki ĝin, kaj resti kapabla ĝin uzi.

Sed kial diable uzi alian lingvon ol Esperanto, kiam ni estas inter Esperantistoj, kaj do ne bezonas scii, ĉu inter ni estas aŭ ne estas eksterlanda gasto, kiu ne kapablas tre lerte uzi la francan ? ».

P. L.

... / ...

2 - « Saluton !

Kia bedaŭraĵo ! P.L. ĵus "tranĉis al mi la herbon sub la piedoj" ! Mi ja pretis reagi same al la "diskuto", kiu iĝis "disputo" inter A kaj B ! ...

Profesie mi instruis lingvon -la germanan-, kaj mi frue konstatis, ke la ĉefa kaj plej efika rimedo por proprigi al si plej bone lingvon estas **praktiki ĝin** ! Ne estas alia "miraklo" ! Tion mi daŭre postulis je mia lernantaro ... Mi mem ĉiam humuris, eĉ fojfoje "grumblis" germanlingve en la klasĉambroj ! Mi memoras, ke iu *fakinspektoro* certagrade miris.. kaj gratulis !

Nu, ne temas pri EDE-temo, pri kiu mi ne taksas utila ĉi-tie konigi mian opinion, sed pri la gorda invito ŝovita en mesaĝoj de listanoj, laŭ kiu ni, francaj esperantofonoj, devas debati en nia nacia lingvo ! Ne surpruzige konstati, ke ofte ni frontas al lingvo de "eternaj balbutantoj" aŭ pli grave, al misuzantoj de nia idiomo, kiam ili penas "mal-obei" al la direktivoj (?) ĵus aluditaj, tiuj lastaj eĉ laŭditaj de "eminentaj" responsuloj. Nomojn mi ne deziras citi !

Anekdote: kiam mi petis informojn al regiona enpartoprenanto de la "Nacia Kongreso" 2012 en St-Aignan (aliland-anoj ĉeestis !) pri la ĝenerala etoso de la evento, li respondis "... Bone, sed krokodilaĵoj" ! Cetere, mi legis en raporto de organizintino de iu neordinara vojaĝo al *Ulan Bator* per fervojo... "Ĝenerala simpatia kunĉeado, sed mi bedaŭras la tro oftajn krokodilaĵojn de... la francoj !" .

Superfluus pluaj komentoj !

Samcelane,

kun senkulpigo petata pro la uzo de esperanto en la supraj linioj ! »

D.P.

=====

Laŭ mia vidpunkto ...recenzo

La elprovado, romano de Roger CONDOM

Ni devas saluti la fakton, ke regiona esperantisto produktis duan verkon en esperanto (post "*Tuikero la harkio*") kaj eldonigis ĝin per sia propra mono.

La aŭtoro, *Roger Condon*, lernis esperanton relative maljuna kaj de nelonge parolas ĝin.

La libro iom suferas de tiu manko de matureco en la lingvo-uzado, malgraŭ ke certe la libro kostis multe da horoj de laboro al la aŭtoro, kiu plie verkis la francan version apude en la sama libro.

Pri la enhavo :

Mi taksas tre interesa la rakonton pri la rilatoj inter *superuloj* kaj *subuloj* en la medio de giganta ŝu-fabrika firmao. Ankaŭ la mil problemoj kaj la anekdotoj de la ĉiutaga vivo estas verve kaj sincere rakontitaj. La stilo estas viva kaj plaĉa. La romano estas facile legebla kaj ne donas kapdolorojn.

Mi tamen bedaŭras, ke la korektantoj ne zorge elsarkis la erarojn aŭ malglataĵojn ĝis la fino.

Se vi ne estas tro postulema pri perfekta esperanto, kaj indulgas al la kelkaj lasitaj eraroj, vi povas ĝui la legadon de tiu libro, kaj ankaŭ instruiĝi pri la labor-kondiĉoj de homoj en ŝu-fako dum la jaroj 1960 ...

Ginette MARTIN

Albanio centjariĝas !

Nia samideano kaj amiko Bardhyl raportas ...




Balkanio antaŭ la Unua Mondmilito

Dume la registaroj de Serbio, Montenegro, Bulgario kaj Grekio decidis alianciĝi kontraŭ Otomana Imperio por ke, post la venko, ili disŝiru el ĝi pliajn teritoriojn, plejmulte el la albanaj vilaĝetoj (Shhkoder, Kosovo, Manastir, Janina). Ilin forte subtenis Rusio, kiu intencis krei en Balkanio iun fortan baron kontraŭ Aŭstrohungario. Ĉi lasta kontraŭe pludeziris, ke oni konservu la aktualan poitikan staton.

Sed la 7-an de oktobro 1912 Montenegro deklaris militon al Turkio, sekvata la 17-an kaj 18-an de oktobro de la ceteraj ŝtatoj, 286 000 serbaj soldatoj eniris albanajn teritoriojn en Kosovo, Makedonio kaj Albanio, frakasante la turkan armeon en pluraj frontoj. Ili dezertigis centojn da vilaĝoj kaj mortigis dekmilojn da albanoj civiluloj, strebante « etnopurigi » la okupitajn teritoriojn. Same agis 20 000 montenegranaj soldatoj, centmiloj da grekoj kaj bulgaroj.



La deklaro de sendependeco en Vlora



Kvarcent volontuloj el la jam okupita kosovo, gviditaj de Isa Boletini, alvenis tagon poste por subteni la novan unuan albanan registaron, estrata de Ismail Qemali, kiu siaflanke alvokis al la registaroj eŭropaj agnoski la sendependecon de la lando.

La alveno de 400 kosovaj volontuloj

Dume, la ceteraj parto de la lando suferis la sovaĝan kaj sanguman okupadon fare de armeoj de la najbaraj ŝovinismaj landoj. Shhkoder kaj Janina daŭre estis sieĝataj de serbo-montenegranaj kaj grekoj.

La grandaj potencoj maltrankviliĝis pro la nova statuso politika en Duoninsulo. Ili kunvenis en Londono por decidi pri la novaj landlimoj. Rusio deziris, ke Albanio estu nur ŝtateto ampleksinta la mezan Albanion, dum Aŭstrohungario celis pli larĝan landon, ampleksinta krom Albanio

ankaŭ certajn teritoriojn albanajn en Kosovo, Grekio, Makedonio kaj Montenegro.

Rezulte, oni decidis pri la aktualaj landlimoj de Albanio, t.e. amputita lando kaj nacio, ekster kiu etendiĝis pli ol duono.

Kiel ajn, albanaj gvidantoj konsideris tiun ian gravan akiraĵon, ĉar la nova sendependa ŝtato fariĝus forta subteno por ĉiuj albanoj en la Duoninsulo.

La vivo de la unua registaro de Ismail Qemali estis mallonga, ĉar Eŭropon trafis somerofine de 1914 tragika milito. Albanion denove eniris la armeoj de ambaŭ intermilitantaj aliancoj, foje aŭstroj kaj bulgaroj, foje francoj, serboj, grekoj, italoj kaj aliaj. La lando pludezertiĝis ĝis la fino de tiu fifama mondmilito.



Granda danĝero stariĝis denove dum la Packonferenco de Versajo, ĉar la ŝovinismaj registaroj najbaraj faris plejblon por elŝiri pliajn partojn el teritorio de la restinta sendependa Albanio. Sed tion malhelpis notinde ne nur la forta volo popola albana, esprimita en la Kongreso de Lushnja januare 1920, sed ankaŭ la subteno fare la deklaro de prezidento Uilson favore al la memdecidemo de popoloj.

Finfine oni akordiĝis lasi Albanion trankvila en sia memstareco, eĉ invitis ĝin al la Ligo de Nacioj en la jaro 1921. La jaroj 1921-1924 notas interesan periodon de parlamentarismo nekonata antaŭe ĉe albanoj, kiu konkludiĝis per registaro de Ahmet Zog, elektita prezidento en 1925 kaj poste reĝo en en 1928. Ĉi lasta invitis fremdajn kompetentulojn por organizi modernan administracion, armeon kaj poicon kaj entreprenis diversajn centralizigajn reformojn.

Ahmet Zog La Unua



La okupiĝo de la lando far faŝisma Italio la 7-an de aprilo 1939 kaj mem la dua mondmilito notis alian malfacilan periodon por albanoj, sed ankaŭ novan statuson de ties landlimoj. Ekde aprilo 1941, nazioj aneksis al Albanio multajn teritoriojn okupitaj de Jugoslavio en Kosovo, Makedonio kaj Montenegro. Ĉikaze tie ekfloris unuafoje albanlingvaj lernejoj kaj administracioj.

En la jaro 1945, fino de la dua Mondmilito, Jugoslavio rekaptis Kosovon kaj Makedonion. Plue, stariĝis dua danĝero en la Packonferenco de Parizo. Ĉar Grekio pretendis tutan sudan parton de la tiel nomata « Londona » Albanio, t.e. sudan Albanion. Bonŝance, la komunisma reĝimo instalita enlande akiris fortan subtenon fare de tiama Sovetunio kaj Jugoslavio komunismaj.

Albanio en la jaroj 1941 - 1944



46 jarojn, la lando restis sub totalitarismo komunisma kaj post 1961 jaro, eĉ des pli, post 1978 jaro, en tuta izoleco, ĝis en la jaro 1991 la sistemo politika kolapsis.

Ekde tiam albanoj aliĝis al la eŭropa granda familio, kies parto natura ili jam estis ekde jarcentoj. La ekonomia nivelo pliboniĝis notinde (la enspezoj averaĝaj pokape altiĝis de 300 USD ĝis 4500 USD), kvankam ankoraŭ la lando konsideriĝas la plej malriĉa en la malnova kontinento.

Ekde la jaro 1999, albanoj havas duan sian ŝtaton, kiu sendependiĝis en 2008... Tio estas Kosovo. Kunlaborante en ĉiuj kampoj ambaŭ, ili sin pretigas aliĝi estonte al Eŭropa Unio.

La komunisma diktatoro Enver Hoxha

Esperanto iĝos integra parto de "Android"-telefonoj

La poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj, kiuj uzas la operacian sistemon "Android" baldaŭ aŭtomate havos Esperantan klavaron. La klavaro laŭplane estos integra parto de la versio 4.2 de Android, aperonta komence de la jaro 2013. *Jacob Nordfalk*, dana programisto, kiu grave kontribuis al la enkonduko de Esperanto en Android, opinias la decidon grava, interalie ĉar Esperanto nun aŭtomate estos videbla en la listo de eniglingvoj.



Libera Folio: Kial laŭ vi la teamo de Apple male tute ne agnoskas la bezonon de Esperanta klavaro?

Jacob Nordfalk: Pro la samaj kialoj kiel *Microsoft* neniam faris Esperantan klavaron por *Windows*. *Windows* estas la posedaĵo de *Microsoft*. *Microsoft* ne akceptas eksterajn kontribuojn kaj ĝenerale agnoskas nur tiajn proponojn, kiuj donas pli da enspezo al la firmao.

Same pri *iPhone* kaj *Apple*. Male, *Android* kiel komuna posedaĵo devas esti kaj resti malferma al eksteraj kontribuoj. Kvankam mia diskutado kun la inĝenieroj de *Google* estis longa,

kaj la postuloj al la kvalito de mia kontribuo estis altaj (entute necesis 8 kodŝanĝproponoj kaj 8 monatoj por la kontribuo [.../...]) la tempo-uzo por ili estis multe pli malgranda, ol se ili devus mem krei Esperantan klavaron.

... pri okultrafa reklamo ! ...



Antaŭ kelkaj monatoj okazis en Pollando konkurso por proponi nomon koncerne la *lu-donan sistemon de urbobobobikloj* en Varsovio.

Laŭ peto de polaj esperantistoj, pluraj samideanoj « sugestis la vorton *veturilo*, kiu ŝoviĝis en la ses lastajn, kiuj restis post unua elekto... **Veturilo**, la sola vorto en esperanto, venkis !

La tutan oficialan reklam-filmeton oni povas spekti tajpante [veturilo.film.instruktażowy_](#)

" Espéranto France-Est " kontribuas al la Eo-jubileo !



Laŭ iniciativo de la « Nancia grupo », la regiona Federacio Espéranto France-Est decidis eldoni poŝtmarkon por emfazi siamaniere la 125 jarojn de Esperanto.

Pluraj membroj « cerbumis » kaj proponis sian propran desegnaĵon. Finfine naskiĝis la ĉi-kuna projekto.

Tiu bunta poŝtmarko afrankos oficiale leteron ĝis 20g (0,60 €). La aĉeto-kosto estas preskaŭ 0,90 € (0,88666666 !). La Federacio povus pagi la diferencon cele propagandon, sed ĉiu mendanto estas libera pagi 0,60 € aŭ 0,90 €.

Ça va mieux en le disant !

L'élève français , ce cancre en langues étrangères

LE MONDE - 22/07/2012

[.../...]

Excellent commentaire : Daniel BILLARD 25/07/2012

« Je n'ai pas remarqué que les Anglais qui visitent notre pays parlent mieux français que nous ne parlons leur langue... Et pourquoi s'astreindre à parler l'anglais lorsque l'on est plombier, menuisier ou maçon ?

Ce terrorisme linguistique concerne avant tout les politiques, les commerciaux et les hommes d'affaire. Si les Anglais peuvent vivre en ignorant notre (belle) langue, nous devons pouvoir survivre en ignorant la leur ! On se débrouille d'ailleurs très bien sur internet sans parler Anglais ! ».



... ni prouu  rideti !...

Iu laboristo de la anglaj fervojoj malkovras ulon kuŝantan sur reloj...

"Povrulo mia, kio okazas, kion vi celas tion fari ?

- Tro pezas por mi la vivo! Mi ne plu havas laboron, la monatan ŝuldon por mia loĝejo mi ne plu kapablas pagi, mia edzino foriris, mia fidela hundo malaperis, la najbaroj ne plu salutas min... Nu, mi atendas la eksprestrajnon el Manchester, kiu nuligos mian ne plu elteneblan ekziston !...

- Eksprestrajnon el Manchester vi ĵus aludis ? Tiukaze, vi devas horizontaliĝi sur la paralelan rejlon, ĉar tiu-ĉi temas pri la eksprestrajno el Londono ! ».

Iu babilema ineto informas sian intruiston :

« Mi, Sinjorino, mi naskiĝis en rozo, sed mia eta frato aperis en brasiko... ».

Ŝia apudsidanta amikino aldonas...

« En nia familio ne okazis same, mi ja simple eliris el la ventro de panjo ! ».

Certgrade surprizita la instruisto iĝas scivolema...

« Kiu do rivelis tion al ci ?

- Sed panjo, evidente ! Ni ja loĝas en apartemento en la urba centro, kaj ĝardenon ni ne posedas... Tio devigis paĉjon elturniĝi alimaniere !... ».



Du infanoj loĝantaj en urbo feritempas sur kamparo. Ili spektas kokinon, kiu ovumas.

...

« Fakte, mi tre ŝatus scii, kiamaniere la kokideto, kiu hejmas interne de tiu ovo, sukcesos eliri eksteren !

- Ankaŭ mi pli ol scivolemas... kiamaniere ĝi eniris tiun ovon ! ».



Du emeritoj promenas en la urboparko, kaj elvokas la rimedojn por kviete vivi en plena sekureco. Ambaŭ posedas gardohundon.

« Imagu, ke la mia estas tre facile ofendiĝema. Antaŭ unu semajno, ĝi tute ne aprezis unu el miaj riproĉojn, tute merititan. Nu, la sekvantan nokton, iu ŝtelisto sukcesis eniri la garaĝon ...

- Hej, kio okazis ?

- Vi ne povus diveni !... Anstataŭ ekboji kaj provi fuĝigi lin, ĝi alportis al li miajn pantoflojn ! »

En hotelo, iu gasto, kiu verŝajne ĝoje festis renkonton de amikoj, staras antaŭ pordo de budo en la hotelhalo. Post vanaj provoj por malfermi la pordon, li plendas ĉe la deĵoranto ...

« Mi tre dezirus atingi mian ĉambron, sed la lifto ne funkcias !

- Ĝi estas en ordo, estimata sinjoro, sed vi staras antaŭ la telefonkiosko ! ».



« ... Akuzito, laŭte alparolas la juĝisto, vi enpenetris en la domon de via najbaro, eĉ uzante pordon malantaŭe, kaj tio senbrue... Kion vi celis tion farante ?

- Hem, sinjoro juĝisto, tiam mi opiniis, ke temis pri mia propra loĝejo !

- Sed kial vi rapide fuĝis, kiam aperis la posedantino ?

- Klare ! Mi tuj pensis, ke ajproksimiĝis mia edzino !... ».



La buso plenplenas, sed tamen junulino sukcesis supreniri je la forlasita haltejo.

Ŝin vidante, viro, jam sufiĉe alta, ekstarigis kaj mangestis al la ulino, indikante sian liberan seĝon. Afable ekridis la junulino kaj milde premas la ŝultron de la viro, kiu nevole residiĝis.

Du minutojn poste, kiam haltas la buso, li denove intencas stariĝi, sed la sama mano sur sia ŝultro, devigas lin retrovi sian sidlokon. Je la sekvanta haltejo li ĉi-foje pli decideme leviĝas, firme flankenpuŝas la inon eldirante :

« Senkulpigu min, fraŭlino, sed mi ja preterveturis jam du neutilajn haltejojn, bonvolu mi petas lasi min malsupreniri ! ».



Geedzoj veturas per aŭto tra arbaro.

Subite la edzino esploras kaj delikate premas la manon de la stiranto.

« Kio okazas, karulino mia ? Ĉu io doloras al vi ?

- Vi ne plu amas min ! Kiam ni ankoraŭ ne estis geedzoj, sur tiu-ĉi loko paneis ĉiam via veturilo ! ».

Por ĉesi drinki, bezoniĝas psika elkligiĝo...

Iun nokton iun mi spertis. Mi estis en veturilo kun amiko, celante rehejmiĝi post ĝuado de iom varma vespero.

Subite intensa humo de aŭto-reflektoraj devigis min malfermi la okulojn, kaj mi ekkriis:

« Priatentu je la alproksimiĝanta veturilo Johano !

- Sed Petro, antaŭ la stirilo vi-mem sidas ! »

Ili baldaŭ festos siajn 25 jarojn da geedziĝo. Scivoleme la edzino aŭdacas peti informon...

« Karuleto mia, ĉu vi povus riveli al mi iom anticipe pri la donaco, kiun vi ofertis al mi ?

- Nu, kial ne, amatineto... Mi pensis al io vere originala... Temas pri vojaĝo al Ĉinio !

- Sed sincere, mi konfuzas ! Jen tro multekosta elekto ! Malfacilas al vi malkovri ion por niaj 50 jaroj !

- Tute ne, mi jam scias ... Mi iros tien por rehejmiĝi vin ! »



La instruanto de skipo de futuraj paraŝutistoj avertas la virojn :

« Laŭ la regularo, mi devas informi vin, ke nur unu mortigan akcidenton por mil saltojn oni statistikumis... Sed kvietigu, vi estas nur tridek ! ».



Policisto haltigas veturilon je la enirejo de aŭtovojejo. En la kofro li malkovras valizon plenplenan je monbiletoj.

« Neimageble !... surpriziĝas la stiranto...


- Kion vi intencas fari per tiu enorma sumo ?

- Unue, pagi lecionojn por trapasi la stirekzamenon ! »

Virino, kiu sidas apude: *« Ne aŭskultu lin, li daŭre ŝercas, kiam li estas ebria ! ».*

Konklude, pasaĝero sidanta malantaŭe:

« Mi ja scias, ke ni spertus malagrablaĵojn pro tiu ŝteliita aŭto ! ».



1 - enigma krado

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
A	A	A	L	B	A	A	L	A	A	N	I
B	I	A	M		E	N	T	F	I	N	K
C	Ĝ	E	O		E	Ŭ		L	I	T	O
D		M	S		M	S		S	I		O

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
A				■						■	
B				■							
C	■						■				
D				■			■				

Transloku malsupren la literojn de la unua krado, aranĝitaj vertikale laŭ alfabeto ordo, en la duan ...

Vi malkovros humuran citaĵon de Sacha Guitry

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2				■					
3									
4					■				■
5							■		
6		■							■
7						■			
8					■				
9			■						
10							■		
11								■	
12	■				■				
13									
14						■			■
15									
16		■							■
17			■						
18				■					

2 - krucvort-enigmo

HORIZONTALALE

1. Politika struktur'.
2. Esprimante malkonsenton. Hebrea nom'.
3. Ekcesa uzad' de drogoj.
4. Plene, sed inverse. Rilate al.
5. Naza malsano. Solfega tono.
6. Plisekigi malsekan grundon per tuboj.
7. Rusia rivero. Kaproblek'.
8. Helena mardi'. Estinta.
9. Regnokodo de Kazahio. Birmia urb'.
10. Acida sal'. Meze de ondo.
11. Infarkto.
12. Senprokraste. Malaja ponard'.
13. Trinkuj'. INVERSE: korta bird'.
14. Plado antaŭ la ĉefa. Tendenc' por io.
15. Genr' de fiŝo, kiel sturgo.
16. Person' kun kiu oni havas rilatojn.
17. Egipita sundi'. Kaserol'.
18. Vicmontra numeralo. Insekca ĉelo.

VERTIKALE

1. Sign' uzata por apartigi frazojn. Spektaklejo.
2. Nest-orkide'. Elektra grandec'. Prefikso.
3. Mezozoik'. Scienc' pri sono.
4. Loko, kie on instruas direkti veturilon. INV: kerna karn' de kokoso.
5. Instrumento. Trinkaĵo. INV: poseda adjektivo. Plezuro.
6. Cilindra kompreset'. Sciigi. Kredem' kiel infaneto.
7. INV: tondu. Kapabl' percepti. Muzikistaro.
8. INV: okazonta malbon'. INV: Nov-Kaledonia urb'. Malgrande. Aparat'.
9. Moviĝi. Stat' de io varmiĝinta ĝis blankarda. Parto de teatra verko.

Koran dakon al nia amik-samideano Joël GRANDJEAN, al kiu ni denove ŝuldas tiun krucvort-enigmon;

Solvoj de la enigmoj 158


- vertikala enigmo:
Konscii, ke oni estas stultulo, estas signo de inteligenteco !

- rebuso
Ne ploru pri la forflugo de la tempo, tio estingas la kandelojn !





Greziljono jubileas... 60 balonoj ĉielen !



Eldonis niaj samideanoj el la urbo por « festi » la 125 jariĝon de esperanto



Siaflanke festis la saman eventon, la CDELI en La Chaux-de-Fonds. Surpodiumis koruso, ero de riĉa muzikprogramo



Ĝoje ĉetablas gepartoprenantoj en la « amika tago » de Freiburg



UK Hanojo - kvin junaj gepartoprenantoj ... simbolo de la universaleco de Esperanto

